

## KVINDEK JAROJ POST MONTEVIDEO

### Enkonduko

Antaŭ precize kvindek jaroj, en 1954, okazis difina evento en la historio de Esperanto: la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion favoran al la lingvo. Ĝi notis la rezultojn, kiujn Esperanto atingis “sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo” kaj komisiis la ĝeneralan direktoron “sekvi la evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo” kaj kunlabori kun UEA tiucele. Se oni esceptas la decidon de la Ligo de Nacioj deklari Esperanton “klara lingvo” por la telegrafio, tiu estis la unua vere oficiala rekono de la Internacia Lingvo fare de interŝtata organizaĵo. Ĝi formis la bazon por formalaj rilatoj inter UEA unuflanke kaj UN kaj Unesko aliflanke, kiuj daŭras ĝis hodiaŭ.

En la hodiaŭa Esperanto-movado, ekzistas diverseco de opinioj pri la graveco de oficiala rekono. Iuj diras, ke Esperanto sukcesos per laboro ĉe la bazo, por krei riĉan komunumon de parolantoj; iuj diras, ke la sukceso de Esperanto ne estas la esenca demando, ĉar vivanta komunumo jam sufiĉas kaj Esperanto ne ekzistas por atingi iun “finan venkon”; iuj opinias, ke la laboro ĉe UN kaj Unesko estas esenca, ne ĉar ĉiuj homoj kredas je la graveco de tiuj organizaĵoj, sed ĉar oficiala rekono povas komplementi kaj plifortigi la bazan laboron. Necesas, laŭ tiu lasta grupo (al kiu mi ankaŭ apartenas), desubismo kaj desuprismo: rekono sen movado estas vana; movado sen rekono estas malkompleta.

En ĉiu komunumo, ĉiu rakonto pri la pasinteco ludas socian rolon kaj estas socie konstruata. La Esperanto-historio konstruiĝas tra la jaroj ne tiom laŭ objektivaj observoj de la partoprenantoj kiom laŭ iliaj perceptoj kaj celoj. Ofte la homoj, kiuj verkas la Esperanto-historion estas tiuj, kiuj ĉefrolas en ĝi: Privat verkis la unuan popularan historion de la Esperanto-movado, en kiu li estis inter la ĉefroluloj. Lapenna, en *Esperanto en Perspektivo*, prezentis historion de la pli moderna epoko, en kiu li ludis eĉ la ĉefan rolon. Estas malfacile ricevi adekvate objektivan perspektivon pri tiuj okazintaĵoj. La fakto, ke mi mem, kiel prezidanto de UEA en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj, aldonis mian propran kontribuon al tiu historio, en mia artikolo en la verko de Lee Chong-Yeong antaŭ du-tri jaroj neniel fortigas ĝian objektivon.

En la nuna kazo, aldoniĝas plia problemo. Internaciaj organizaĵoj estas politikaj strukturoj, en kiuj la membroj manovras por gajni avantaĝojn, uzas siajn armilojn ŝpareme por konservi moralan bonharon ĉe la aliaj membroj, kaj sekve foje rezolucias kontraŭ aferoj, al kiuj ili simpatie rilatas, kaj por aferoj, kiujn ili nur varmete apogas. Foje, estas pli facile subteni rezolucion kaj poste ne plenumi ĝin, ol kontraŭi ĝin. Krome, la estroj de delegacioj foje estas liberaj mem decidi pri difinitaj tagordaj punktoj, kaj foje ricevas instrukciojn de siaj registaroj. Se afero estas juĝata iom sensignifa, delegaciestro estas ofte libera fari tion, kion li aŭ ŝi deziras, sed la probableco de konkretaj rezultoj el tia rezolucio estas tre malgranda. Pro ĉio ĉi kaj similaj konsideroj, ĝuste pesi sukcesojn kaj malsukcesojn de Esperanto ĉe internaciaj instancoj estas aparte malfacile.

## La unua stadio

Okazis kvar grandaj klopodoj gajni la atenton kaj subtenon de internaciaj registaraj organizaĵoj por Esperanto. La unua okazis antaŭ la Ligo de Nacioj inter la Mondmilitoj. La esperantistoj kaj iliaj subtenantoj serioze parolis pri la ebleco, ke la Ligo akceptu Esperanton kiel laborlingvon, eventuale eĉ la solan laborlingvon, sed ne sukcesis, aŭ ne kuraĝis prezenti tian rezolucion. La plej alta punkto en la historio de Esperanto antaŭ la Ligo estis raporto de la ĝenerala vicsekretario d-ro Nitobe Inazo, kiu ĉeestis la UK en Prago en 1921 kaj ricevis tre pozitivan impreson. Lia raporto, kiu interalie proponis enkondukon de Esperanto en la lernejojn de la ŝtatoj-membro, estis akceptita eĉ unuanime ĉe la instancoj de la Ligo, sed oni kviete enterigis ĝin per tiu akcepto, kaj la raporto ne plu aperis sur la tagorda horizonto.

Kiam la Komisiono pri Intelekta Kooperado traktis Esperanton, ĝi, sub influo de Francio, rezoluciis, ke “ĝia [t.e. la Komisiona] penado devas antaŭ ĉio celi favoradon al la studo de la vivantaj lingvoj kaj fremdaj literaturoj, ĉar tiu studado estas unu el la plej potencaj rimedoj de intelekta kaj monda reproximigo inter homoj diversnaciaj, kio estas la idealo mem de la Ligo de Nacioj” (Privat 1927: 147). Alivorte dirite, Esperanto ne estas lingvo kiel la aliaj, kaj ne alproximigas la naciojn kiel studado de la aliaj lingvoj supozeble tion faras. La sola daŭra atingo ĉe la Ligo estis tio, ke oni deklaris Esperanton “klara” lingvo por la telegrafio – do lingvo egala al la ĉefaj etnaj lingvoj. Per tiu rezolucio, tiuj membroj, kiuj simpatie rilatis al Esperanto, savis al si la konsciencon, kaj la kontraŭuloj sendube opiniis, ke cedi tiun iom malgrandan gajnon al la esperantistoj ne forte kompromitos ilian kontraŭan pozicion.

## La dua stadio

La dua granda kampanjo por Esperanto komenciĝis en la unuaj jaroj de Unuiĝintaj Nacioj. Petskribo favora al Esperanto, prezentita al UN en 1950, portis preskaŭ unu milionon da unuopaj subskriboj kaj la subtenon de organizaĵoj kun pliaj 15 milionoj da homoj. Plusendita de UN al Unesko (UN ŝajne volonte liberiĝis je la problemo), ĝi atingis la tagordon de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954. UEA sendis reprezentanton al la konferenco – d-ron Ivo Lapenna, kiu jam zorge preparis la grundon. Surloke li kaj la urugvajaj esperantistoj agadis por prilabori la delegaciojn kaj reprezentantojn, interalie per prezento de Universala Ekspozicio de materialoj pri Esperanto, kaj sukcesis signife influi la debaton. Tiu debato, post iom intensa politika manovrado, havis esence du rezultojn: decidon doni al UEA “konsultajn rilatojn,” do rekoni UEA kiel neregistaran asocion en formalaj rilatoj kun Unesko (tiu ĉi decido estis sendependa de la posta debato), kaj (post energia interveno de Lapenna) rezolucion kun la jena teksto:

La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto:

*Notas* la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

*Rekonas*, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

*Notas*, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

*Komisias* la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

La historio de la sukceso ĉe Unesko, kiu finiĝis per la rezolucio favora al Esperanto de la 10-a de decembro 1954, estis ofte rakontata – precipe de ties ĉefa rolanto (Lapenna 1955, 1974). Li bone komprenis, ke la rezolucio havas duflankan, eĉ triflankan signifon. Unue, ĝi objekte faciligis la vojon por prezenti Esperanton en Unesko-medioj: se Unesko almenaŭ montris pozitivan sintenon al la laboro de la esperantistoj, tio donis la eblecon levi la pretendojn de Esperanto antaŭ Unesko kaj utiligi ĝiajn komunikajn kanalojn por disvastigi la mesaĝon de Esperanto.

Due, la rezolucio ebligis, ke UEA povu enviciĝi inter la organizaĵoj, kiuj laboras por defendo de la homaj rajtoj kaj la idealoj de humaneca internaciismo – tiel ligante la idealojn de Esperanto al la gvidprincipoj de la internacia vivo, laŭ la principoj de Lapenna kaj de multaj homoj ligitaj al Unesko. Evidente, tio mesaĝis ne nur al la eksterstarantoj sed ankaŭ al la esperantistoj: Lapenna konsciis, ke la Unesko-rezolucio ne nur fortigis la rilaton kun Unesko sed ankaŭ donis fortan impulson al la optimismo kaj celkonscio de la membroj de UEA kaj la esperantistoj ĝenerale. Li plene ekspluatis tiun okazon, kreante ĉirkaŭ la atingon certan mistikon, certan mitologion, kiu estis pravigebla kiel paŝo al solidarigo de la “pacaj batalantoj” malantaŭ li, sed eventuale iom troiga, el objektiva vidpunkto, pri la signifo de la rezolucio.

La rezolucio ne tuŝis la Unesko-buĝeton kaj sekve ne havis ian signifan rektan efikon je la laboro de la organizaĵo. Ĝi postulis, ke la Ĝenerala Direktoro sekvu “la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto” en difinitaj kampoj, sed tio estis ĉio. Relative facile la opozicio kontraŭ eventuala rezolucio pri Esperanto povis do cedi sub la retorika pafatako de Lapenna, sen multon perdi. Jes, Esperanto gajnis formalan pozicion en la sino de Unesko, sed ne, tio ne signifis, ke ĝi ŝanĝis ĝiajn labormanieron aŭ prioritatojn. Konsciante tion, Lapenna sciis, ke estas despli grave mobilizi la esperantistojn malantaŭ la rezolucion.

Jam en la januara revuo *Esperanto* de 1955 la vicredaktoro Reto Rossetti aludis al la “Herakla laboro” de Lapenna, kaj la prezidanto de la Asocio, Ernfrid Malmgren, el Svedio, asertis, ke per la Unesko-rezolucio Esperanto estas formale apogata de Unesko kaj UEA estas akceptita al konsulta rilato kun tiu “plej alta kultura instanco de la mondo.” En la aero (kaj la Esperanto-gazetaro) ŝvebis vortoj kiel “triumfo,” “miraklo,” kaj “venko.” Tamen, pri apogo de Esperanto ne temis, sed nur pri rekono de ĝiaj atingoj, kaj Malmgren paŝis almenaŭ al la limoj de la efektivo: Lapenna ja sukcesis neŭtraligi la

opozicion, sed ne trati en malamikan teritorion. En sian propran prezenton de la okazintaĵoj en la februara *Esperanto*, Lapenna bakis ĉiujn ingrediencojn de epopea sukceso, kaj la cetera Esperanto-gazetaro eĥis similajn sentojn. La gvida mito ja facile konstrueblis: sendito de Universala Esperanto-Asocio transnavigis oceanojn por batali por Esperanto ĉe la alia flanko de la mondo; tie li batalis kontraŭ (en la vortoj de Malmgren) “eĉ pli da ignorado, pli da antagonismo, pli da malamikeco” ol li atendis; rezolucio pri Esperanto malsukcesis antaŭ komisiono de la Ĝenerala Konferenco pro senkultura kaj senscia interveno de unu delegito, sed, post protesta kampanjo, la demando estis levita denove en la pleno, la opozicio estis renversita, kaj la rezolucio sukcesis. Se la vaporŝipo, kiu reportis Lapenna al Eŭropo similis la ŝipon de venkinta admiralo, tio ne estis granda surprizo. Pri Lapenna, Marjorie Boulton poeziis (*Eroj* 328) jene:

Ivo Lapenna, ĉiusence granda,  
 jen kosma energio propaganda,  
 la enkarniĝ’ de l’Esperanta Vorto,  
 la mondpotenco de morala forto!  
 La oratoro ardas kaj sinceras;  
 erudicie la juristo kleras;  
 organizanto indas je l’insigno;  
 la homo luktas pro la homa digno;  
 la diplomato lertas intervjue  
 kaj la lingvisto poliglotas flue;  
 kaj krome li atletas kaj muzikas...  
 sed kiel lojalege li amikas!  
 Ivo Lapenna, tiel multkapabla,  
 sin montras homa, milda kaj afabla,  
 kun simplaj homoj, simpla; kaj adoron  
 forpuŝas, ĉar ĝi ĝenas lian koron.  
 Kun aŭreolo, en la verda fresko,  
 brilegas la Venkinto ĉe UNESKO,  
 antaŭen gvidas nin per gesto bona;  
 kuraĝe, do, antaŭen kun Lapenna.

William Auld, finante sian monumentan verkon *La Infana Raso* la 27-an de januaro 1955, decidis dediĉi ĝin al la “kara doktoro” venkinta en Urugvajo, skribante, “Neniam antaŭe dum la ekzisto de la internacia lingvo okazis tia sukceso, kia Montevideo” (Auld 1987: 751). Dum iom da tempo la verbo “blinkenbergi” (t.e. publike stulti malgraŭ prezento de memevidentaj faktoj), kaptis niĉeton sur la lingvan monton de Esperanto (kvankam poste ĝi malaperis), kvazaŭ eĉ la leksiko de la lingvo rekonu la dimensiojn de la venko. Marjorie Boulton nomis sian katon “Montevideo.”

Per sia Montevidea sukceso, Lapenna lanĉis tion, kion li nomis “la moderna UEA”. Eĉ se la rezolucio ne estis en si mem deklaro pri subteno al Esperanto fare de Unesko, ĝi almenaŭ signalis la pretecon de Unesko serioze pritrakti tiun ĉi paralelan agadon por plibonigi la sorton de la homaro. La decido pri “konsultaj rilatoj” etendiĝis ankaŭ al UN, kie UEA ĝuis formalajn rilatojn pro tio, ke ĝi estas rekonata de Unesko.

Sed la sekvoj de Montevideo, kvankam bele kaj pozitive prezentitaj en la Esperanto-gazetaro kaj en la protokoloj de UEA, ne alportis signifajn ŝanĝojn en la sinteno de Unesko. Interalie, Lapenna estis tre insista pri la neŭtraleco de UEA, kaj singarde rilatis al formado de koalicioj kun aliaj organizaĵoj. Kiel viktimo mem de la usona emo al falsa denuncado de “komunistoj,” li nepre volis eviti ĉian superfluan politikan enplektiĝon. Sed omletojn oni ne kuiras sen rompi ovojn (kiel diras la proverbo anglalingva), kaj la strikta limigo de la laboro de UEA en la sino de Unesko al lingvaj demandoj lasis ĝin iom izola. UEA donis sian subtenon al ĉiuj grandaj kampanjoj de Unesko, partoprenis la agadon de la konferenco de neregistaraj organizaĵoj en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, kaj diligente respondis al ĉiuj oficialaj enketoj, sed nur malfacile ĝi progresis en la klopodoj profiligi Esperanton en la laboroj de Unesko kaj UN. La centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof donis unu okazon: Unesko nomis Zamenhof unu el la grandaj figuroj de la homaro.

### **La tria stadio**

La tria iniciato por Esperanto antaŭ la internaciaj organizaĵoj estis konstruita parte sur la fundamenton de la atingoj en 1954 kaj parte reage al la magra rikolto, kiu sekvis el tiu “rezolucio sen buĝetaj sekvoj.” Por konstrui pli firman bazon, tria granda kampanjo lanĉiĝis nelonge post la dua: propono al UN, ke tiu organizaĵo “solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj” (Lapenna 1974: 779-80). Lapenna do celis sekvi vojon iom similan al tiu, kiun oni sekvis per la unua postmilita klopodo (kiun oni poste ŝovis al Unesko). Li prave antaŭvidis, ke la kolektado de subskriboj al la propono mobilizos la esperantistojn ĉirkaŭ komunan taskon (taskon, cetere, egale akcepteblan al la nekomunista okcidento kaj la komunista oriento), sed malpli klara estis lia koncepto de strategio, kiu sekvu poste. Ĉu UN estas adekvate pretigita por akcepti tian proponon? Kiujn specifajn paŝojn ĝi sekvu se ĝi ja akceptiĝos? Pli sekura sur la interna tereno ol la ekstera, Lapenna per ĉiuj fortoj stimulis kolektadon de subskriboj: la nova propono rikoltis ilin amase – denove proksimume unu milionon da individuaj subskriboj, kaj ĉi-foje subtenon de organizaĵoj kun pli ol 70 milionoj da membroj. Sed la sekretariato kaj la unuopaj UN-misioj, malgraŭ la laboro de UEA-reprezentantoj en Novjorko, ne estis sufiĉe prilaboritaj kiam Lapenna enŝipiĝis el Eŭropo por prezenti la proponon. Kiam li alvenis, la sesio de la Ĝenerala Asembleo jam malfermiĝis, kaj Novjorko plenis je diplomatoj kaj diplomatia agado. Sed la medio de UN en 1966, en la urbo de ties ĉefsidejo, estis alia ol la intima medio de Unesko en 1954, kaj vane la reprezentantoj de UEA luktis por kapti la atenton de la Asembleo aŭ de la sekretariato.

Post klopodoj renkonti la ĝeneralan sekretarion de UN, U Thant, Lapenna fine transdonis la proponon al ties Ĉefo de Kabineto kaj reenŝipiĝis al Eŭropo. Malgraŭ pluraj klopodoj puŝi la proponon tra la kanaloj de UN, ĝi restis en la posedo de la oficejo de la Ĝenerala Sekretario, sen konkretaj rezultoj. La oficejo de la Ĝenerala Sekretario rifuzis informi la diversajn Ŝtatojn-Membrojn pri ricevo de la propono kaj plue asertis, ke “ĉia ajn propono por la studo de la ebleco uzi Esperanton kiel internacian lingvon devos veni de iu

Membro-Registaro” (Lapenna 1974: 787). Narasimhan substrekis principon ofte sekvatan de la Sekretariato, precipe kiam ĝi frontas ion, kion ĝi ne deziras plenumi: UN estas organizaĵo de membroj, kaj la membroj decidas ĝian tagordon kaj programon. La sola surprizo tie ĉi estas, ke internacia juristo de la eminento de Lapenna surpriziĝis.

La fakto, ke tiel giganta nombro da homoj kaj organizaĵoj subskribis la proponon, montris, ke Esperanto estas pli ol diletanta afero, sed ne nur ne movis la Sekretariaton, sed eĉ firmigis la opozicion: montri favoron al Esperanto havus konkretajn sekvojn: oni devus ion fari pri ĝi. Prefere, do, enkasigi la negativajn sentojn de la esperantistoj sed resti sen reago.

Kvankam Lapenna klopodis doni al tiu esence negativa bato pozitivan vizaĝon, kaj kvankam UEA diligente plusekvis la laboron de UN, subtenis ties kampanjojn, kaj intervenis laŭeble, farante samon ankau ĉe Unesko, la aero estis elpremita el la pulmoj kaj la laboro de UEA ĉe UN kaj Unesko rutiniĝis sen novaj signifaj iniciatoj aŭ ŝanĝoj.

Ekzistas en tiu ĉi rakonto pluraj lecionoj. Ni notu unue, ke tute sendepende de eventuala diplomatia triumfo antaŭ Unesko, tiu konscia konstruo de la historio de Montevideo en koheran, rakonteban kaj esperigan atestaĵon, estis en si mem publikrilata triumfo: ĝi donis al la Esperanto-movado senton de direkto, kiu kanalizis la energion de la aktivuloj kaj kreis certan nivelon de interkonsento pri la vojo irenda. Unu el la plej grandaj meritoj de Lapenna (kvankam eventuale temis pri duflanka klingo) estis lia kapablo reĝisori kaj dresi la atingojn de UEA por krei senton de komunaj valoroj en la Asocio.

Sed povus esti, ke Lapenna komencis kredi la propran retorikon. Kiel lerta advokato, li devus kompreni, ke rezoluciojn oni atingas per kombino de kompromisoj kaj minacoj, sed ke nek unu nek la alia en si mem produktas emon plusekvi tiajn rezoluciojn kaj efektive plenumi ilin. La elpaŝo per la petskribo uzis samajn metodojn, kiujn oni uzis antaŭe – sed inter 1954 kaj 1966 la mondo ŝanĝiĝis kaj Lapenna malpli. Mankis, ŝajne, la novaj ideoj, kiujn nova epoko postulis. Inter 1954 kaj 1966, la plej signifa evoluo ĉe UN estis la ekspansio de la membronombro responde al amasa malkoloniigo. Tiu tutmondiĝo ne trovis respondon en la strategio de UEA, kiu restis tro forte ligita al la malnova nocio de esence eŭropocentra interkonsento de la nacioj.

Ne ĉiuj aktivuloj en UEA restis en sia eŭropa mondperspektivo. Tibor Sekelj, el Jugoslavio, geografo, esploristo, mondvojaĝanto, daŭre insistadis pri la neceso, ke la esperantistoj portu sian mesaĝon al la tuta terglobo, ne nur al Eŭropo kaj selektitaj landoj de la cetera mondo. Interalie, li diligente laboris por Esperanto inter la tielnomataj Neligitaj Nacioj, kie Jugoslavio estis aparte aktiva. UEA donis sian moralan subtenon, sed tiu ne estis direkto, kiun Lapenna trovis aparte alloga.

### **La kvara stadio**

En 1974 mi fariĝis prezidanto de UEA kaj komencis sekvi novan direkton – parte inspiritan de la laboro de homoj kiel Tibor Sekelj. Li prave atentigis, ke la internacia vivo profunde ŝanĝiĝas: okazas certa ekonomia tutmondiĝo, kiu ŝanĝas la rilatojn inter la

popoloj kaj inter la unuopaj homoj; la fendo inter la riĉa Nordo kaj la malriĉa Sudo plivastiĝas; la epoko de eŭropa dominado finiĝadas. Mi mem, en mia rolo kiel prezidanto de UEA, faris serion da mondvojaĝoj, vizitante la novan Esperanto-movadon en Irano, la movadon en Hindio, kaj la establitaĵojn Esperanto-asociojn de Japanio kaj de Suda Ameriko. Mia celo estis informi la tieajn esperantistojn, ke UEA estas ankaŭ ilia organizaĵo, kaj ke ĉie, kie troviĝas, aŭ povus troviĝi, esperantistoj, UEA havas sian rolon. En UEA mem ni starigis novajn, pli aktivan “komisionon” ĉe Unesko en Parizo kaj eĉ malgrandan oficejon de UEA en Novjorko por kontaktoj kun UN. UEA fariĝis aktiva rolanto en la agado de UN kaj Unesko, ne nur pri lingvaj demandoj, sed ankaŭ pri aliaj aspektoj de homaj rajtoj. Formiĝis aliancoj inter neregistaraj organizaĵoj, en kiuj UEA aktive rolis. UEA komencis peti kaj ricevi subvenciojn de Unesko kaj UN. CED, la esplorcentro de UEA, organizis jarajn konferencojn en kunlaboro kun la traduka fako de UN, kaj aperigis ĉiujare ties aktojn. Inter la partoprenantoj en tiuj konferencoj estis la tiama fakestro de UN pri homaj rimedoj Kofi Annan, hodiaŭ la Ĝenerala Sekretario.

Ĉe Unesko, fariĝis ĉiam pli varma la debato pri komunikado. Jam antaŭ 1974, Lapenna komencis iom diskrete levi ĉe Unesko kaj UN demandojn pri lingva diskriminacio kaj homaj rajtoj: post 1974, tio fariĝis signifa parto de la argumenta strategio de UEA. Estis pli kaj pli evidente, ke la lingvan problemon en UN oni iasence solvas: utiligo de la angla lingvo fariĝis ĉiam pli ofta, kaj la situacio de la franca lingvo, la alia laborlingvo de la sekretariato, malfortiĝis. Sekve la brula demando ĉe UN ne plu estis tio, ke la homoj ne interkompreniĝas, sed ke, interkomprenante, ili tion faras en situacio esence malegala. Precipe la novaj, ekskoloniaj ŝtatoj sentis tiun malegalecon: la amasmedioj kaj la kulturaj produktoj de la libera merkato inundadis iliajn landojn, kaj iliaj klopodoj konservi la proprajn kulturajn valorojn estis ĉie minacataj. Estis do nature, ke UEA aliĝu al la komunika debato kaj laboru por subteni la nocion de rajto al komunikado, laŭ kiu ĉiu homo rajtu ne nur esprimi sin sed partopreni dialogon – ĉar sinesprimo sen aŭskultantoj malmulton valoras. UEA estis inter la ĉefaj neregistaraj organizaĵoj ligitaj al la granda tutmonda debato pri komunikaj rajtoj, kiu dominis la tagordon de Unesko dum tiuj jaroj. UEA fariĝis estrarano de la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj kaj dum ses jaroj (la maksimuma mandato) eĉ prezida organizaĵo de la kunordiga forumo de neregistaraj organizaĵoj ĉe Unesko. Tio altigis la prestiĝon de la Asocio kaj plifirmigis ĝian formalan statuson. Kaj la rilatoj inter Unesko kaj UEA fariĝis pli reciprokaj.

Kiam en 1977 estis starigita en Unesko Internacia Komisiono por la Studado de Komunikaj Problemoj sub la gvido de la irlanda diplomato Sean MacBride, UEA estis tiu organizaĵo, kiu levis la lingvan demandon en tiu kunteksto, insistante, ke oni ne povas studi la internacian komunikadon sen atento al lingvaj demandoj. Post pluraj intervenoj de UEA, inter malkvietigaj indikoj, ke la Komisiono ne intencas trakti la lingvan problemon, la raporto de la komisiono en 1980 specife aludis ne nur al la lingva dimensio de la komunikado sed ankaŭ al tio, ke eventuale “la disvastigo de unu facila, universala lingvo, komprenebla kaj alirebla por ĉiuj personoj, povus plifortigi nacian solidarecon kaj rapide malkonstrui la barilojn al komunikado inter la diversaj popoloj” (MacBride 1980: 50) – vortumo ne ideala, sed tre signifa.

Intertempe, la UK-oj fariĝis regule vizitataj de reprezentantoj de UN kaj la fakaj instancoj: la sekretario de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, Robert Müller, la ĝenerala direktoro de la Internacia Telekomunika Unio, Richard Butler, kaj, en 1977, la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadou Mahtar M'Bow.. En 1977, kiam UEA, kiel unua granda neregistara organizaĵo en la mondo, kiu traktis la temon, dediĉis sian kongreson al la temo "la rajto je komunikado," la ĝenerala direktoro de Unesko gastis ĉe la Kongreso en Rejkjaviko. Jam en 1975, M'Bow sendis salutmesaĝon al la UK en Kopenhago, en kiu li laŭdis la laboron, kiun la esperantistoj "entreprenis por internacia kompreniĝo kaj interproksimigo de la popoloj" (M'Bow 1975). Nesurprize, do, ke la ĝenerala direktoro eĉ komencis publike paroli pri la valoro de "uzado de komuna lingvo." "Unu el la plej esencaj taskoj de Unesko," li diris en sia parolado en Rejkjaviko, "estas la plifortigo de la mondopaco, la komprenemo inter la popoloj kaj la kunlaboro inter la nacioj. Esperanto historie fontas el la sama principo" (M'Bow 1977). Lia mesaĝo de la posta jaro (M'Bow 1978) aldonis, "Kun plej laŭdinda persistemo vi faris vin la pioniroj de internacia kunlaboro, kiu malfermas novajn vojojn al dialogo inter la popoloj kaj inter la kulturoj."

En 1985 prezentiĝis denove okazo plifortigi la rilatojn kun Unesko. La okazo estis la Ĝenerala Konferenco en Sofio, kaj la ĉefa rolanto estis Tibor Sekelj. Jam de jaroj la delegacioj de Unesko ricevis informojn pri Esperanto kaj UEA. Ili konsciis pri la rolo de UEA en la debato pri komunikado kaj pri la subteno al la laboro por Esperanto, kiun montris s-ro M'Bow. En la UK Aŭgsburgo en 1985, la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj, sub mia prezido, ellaboris tekston de rezolucio prezentebla al Unesko okaze de la Centjariĝo de Esperanto, kaj nomis Tibor Sekelj kaj la prezidanton de la Bulgara Esperantista Asocio, Petr Todorov, reprezentantoj de UEA en la Ĝenerala Konferenco. Kontaktoj kun landaj Unesko-komisionoj en deko da landoj donis kvazaŭ antaŭaverton pri la intencoj de UEA kaj komencis la procedon de kolektado de voĉoj. En Sofio mem, Sekelj sukcesis konvinki la jugoslavan delegacion prezenti la rezolucion, kaj utiligis ĉiujn siajn abundajn kontaktojn por varbi subtenon. Baldaŭ, kiel kunprezentantoj de la rezolucio estis varbitaj la delegacioj de Bulgario, Ĉinio, Hungario, Kostariko, Pollando, kaj Sanmarino. La rezolucio aperis sur la oficiala tagordo, kaj Sekelj kaj liaj kolegoj manovris por doni al ĝi la plej oportunan lokon en la proponata laborprogramo de la organizaĵo. Utiligante la formalajn rajtojn de UEA kun Unesko, Sekelj petis kaj ricevis la parolon en la pleno, kaj en sobra angla lingvo prezentis dum dekduo da minutoj la atingojn kaj pretendojn de Esperanto kaj de UEA. La postan tagon lia parolado estis distribuata en presita formo al ĉiuj delegacioj kiel formala dokumento.

La propono de la rezolucio estis asignita al la Kvara Komisiono de la Konferenco por detala pritrakto, kaj tie Sekelj kaj kolegoj laboris senlace kaj diligente. Kiam venis la tempo de la komisiono voĉdono la rezolucio estis akceptita – unuanime.

De la komisiono la rezolucio ree vojaĝis al la pleno, kie, sen plia diskuto, ĝi estis akceptita sen kontraŭaj voĉoj la 8-an de novembro, 1985. Jen ĝia teksto:

La Ĝenerala Konferenco,

**Konsiderante**, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV. 1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la

kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

**Memorigante**, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

**Rekonante** la grandajn eblojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,

**Notante** la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝian partoprenon en tiu agado,

**Konsciante** pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto;

**Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;

**Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;

**Invitas** la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;

**Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

Komparo inter la rezolucioj montras, ke tiu de Sofio, fundamentita sur la Montevidean, multe pli amplekse kaj profunde ligas Uneskon al la demando pri Esperanto. Simo Milojeviĉ, en la revuo *Esperanto* de decembro 1985, listigis la jenajn novaĵojn:

- transiro de regiona (eŭropa) kaj beletra lingvo al tutmondiĝo kaj penetro en diversajn vivosferojn (alineo 2);
- rekono de la potencialoj de Esperanto kaj transiro de la pasinteco al la estonteco (alineo 3);
- rekta rekono al UEA kaj ĝia unika komunika reto (alineo 4);
- gratulo pro la Jubileo;
- peto al la ĝenerala direktoro daŭre sekvi la evoluon;
- rekta invito al la ŝtatoj-membroj marki la jubileon kaj instigi lernejan kaj universitatan studadon de la lingvo-problemo kaj Esperanto;

- rekomendo al la neregistaraj organizaĵoj fari simile kiel la ŝtatoj-membroj kaj kvazaŭ sekvi la ekzemplon de la kunlaboro inter Unesko kaj UEA.

El ĉiuj tiuj punktoj eble le plej gravaj estis tiuj, kiuj instigis al konkreta agado, kaj tiu, kiu specife rekomendis la studadon de lingvaj problemoj kaj la lernadon de Esperanto. Pri la lernado de Esperanto la Ĝenerala Konferenco en Montevideo ja tute silentis, malgraŭ ĉiuj klopodoj de UEA en la antaŭaj jaroj. Nun, tie ĉi en Sofio, finfine Unesko rekte rekomendis ĝin.

## La sekvoj

Sed en la periodo de la plej granda triumfo de Esperanto en la rilatoj kun Unesko, la svatato mem subite komencis perdi sian allogon. Serio da paŝoj, unue flanke de la usona registaro, subite haltigis la debaton pri komunikado. Usono asertis, ke tiu debato fariĝas klopodo ĉefe de la evoluantaj landoj limigi la liberan fluon de informoj trans la landlimoj kaj pravigi la daŭrigon de diktaturaj registaroj; la evoluantaj landoj siavice protestis, ke Usono interesiĝas ĉefe pri forigo de ĉia limigo al la senbarila eksportado de ties kulturaj produktoj. Perdinte sian paciencon, Usono finfine anoncis sian eksiĝon el Unesko, forportante ne nur sian politikan influon sed ankaŭ sian kotizon, kaj tiel metante Uneskon en severan finanĉan krizon. Britio kaj Israelo sekvis la ekzemplon de Usono, kaj la restantaj okcidentaj ŝtatoj komencis la sisteman malmonton de la debatostrukturoj ĉirkaŭ komunikado kaj redirektis Uneskon al malpli disdividaj temoj (kaj temoj malpli fekundaj por Esperanto). La mandato de Ĝenerala Direktoro M'Bow finiĝis kaj nova gvidantaro kaj nova laborprogramo enkondukiĝis.

La rezolucio daŭre havis sian valoron, eĉ se UEA, kiel subtenanto de la debato pri komunikado kaj de la eksa Ĝenerala Direktoro, dume perdis grandan parton de sia influo. La rezolucio ja faciligis al UEA la akiron de subvencioj kaj aliaj specoj de helpo de Unesko, kaj ĝi instigis plurajn registarojn ludi sian rolon en la festado de la Jubileo per aperigo de poŝtmarkoj, subteno de kongresoj kaj konferencoj, kaj aliaj elpaŝoj. Sed kiel elemento en la “malnova” Unesko de la debato pri komunikado, ĝi pruvis denove, ke Esperanto estas rigardata aŭ kiel afero sensignifa kaj sekve nedanĝera, aŭ kiel rekta minaco al la hegemonio de difinitaj mondaj interesoj, precipe kulturaj interesoj. Ĉe mi (konscia tamen pri la emo de la rolantoj konstrui la historion laŭ propra favoro) ne estas dubo, ke la rezolucio de 1985 estas la plej alta atingo de Esperanto ĝis la hodiaŭa tago en la sino de la grandaj internaciaj organizaĵoj – sed la atingo de 1985 ne estus eĉ imagebla sen la atingo de 1954, kaj tiu de 1954 havas siajn radikojn en la laboro de Edmond Privat kaj liaj kolegoj en la koridoroj de la Ligo de Nacioj en Ĝenevo. Tiel unu sukceso konstruiĝas sur alian.

Ni samtempe agnosku, ke la morala influo de UN kaj Unesko iom malfortiĝas en la nova “tutmondiĝo” de malfermaj merkatoj kaj terglobaj kapitalaj fluoj. Eĉ la Esperanto-movado mem, sub influo de tiuj, kiuj konsideras tiun movadon unuavice lingva komunumo (kontraste al idealista organizaĵo, kiu celas konvinki la mondon pri difinita principo de socia organiziĝo), kovas dubojn pri la graveco de “desupra” pledado por

Esperanto. En la 21-a jarcento, necesas nova plurisma strategio por UEA – sed tiu nova strategio nepre havu sian lokon por la grandaj organizaĵoj, kiuj tamen restas influaj en la mondo kaj, en siaj plej bonaj momentoj, fontoj de inspiro kaj saĝo. La plej granda honoro, kiun ni povas doni al Lapenna, kiu laboris tiel forte kaj fine sukcese en Montevideo en 1954, estas daŭrigi la laboron saĝe kaj lerni la lecionojn de la historio.

### **Cititaj kaj fontaj verkoj**

- Auld, William. 1987. *En barko senpilota: plena originala poemaro*. Pizo: Edistudio.
- Boulton, Marjorie. 1959. *Eroj kaj aliaj poemoj*. La Laguna: Stafeto.
- Lapenna, Ivo. 1955. Unesko rekonis la valoron de Esperanto por la edukado, scienco kaj kulturo. *Esperanto*, 48: 37-53.
- Lapenna, Ivo, Ulrich Lins, kaj Tazio Carlevaro. 1994. *Esperanto en perspektivo: faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*. Londono k Roterdamo: UEA.
- Lins, Ulrich. 1986. *The Contribution of the Universal Esperanto Association to World Peace*. Esperanto Documents 37A. Roterdamo: UEA
- Macbride, Sean, k.a. 1980. *Many Voices, One World: Report by the International Commission for the Study of Communication Problems*. Londono: Kogan Page; Novjorko: Unipub; Parizo: Unesco.
- Malmgren, Ernfrid. 1955. Novjara saluto de la prezidanto de UEA. *Esperanto*, 48: 1-2.
- M'Bow, Amadou-Mahtar. 1975. Daŭrigi sur esence grava kampo. *Esperanto*, 68: 122.
- M'Bow, Amadou-Mahtar. 1977. Vin motivas respekto al kultura diverseco kaj deziro de interproksimiĝo. *Esperanto*, 70: 144-47.
- M'Bow, Amadou-Mahtar. 1978. Vi pioniras novajn vojojn. *Esperanto*, 71: 151.
- Milojevic, Simo. 1985. Sofio pli ol rekonfirmas Montevideon. *Esperanto*, 78: 201-2.
- Privat, Edmond. 1927. *Historio de la lingvo Esperanto: la movado 1900-1927*. Leipzig: Ferdinand Hirt.
- Rossetti, Reto. 1955. Laboro herakla. *Esperanto*, 48: 2-3.
- Sekelj, Tibor. 1983. *Elpafu la sagon*. Roterdamo: UEA.
- Sekelj, Tibor. 1985. Unesko denove rezolucias favore al Esperanto. *Esperanto*, 78: 202-4.
- Tonkin, Humphrey. 1982. *Esperanto in the Service of the United Nations*. Esperanto Documents 27A. Roterdamo: UEA.
- Universala Esperanto-Asocio. 1983. *Unesco and the UEA 1976-1982*. Esperanto Documents 32A.

